





## NIA KONGRESO EN BOURGES

### Protokolo de la jarkunveno

La 6-an de junio, ĉe la Fratinoj de la Karitato en Bourges, 23 gekongresanoj partoprenis la debatojn en ĝoja etoso. Post kanto de "Dio pli apud vin", nia prezidanto malfermis la kunvenon. S-ro Morin salutis kaj bonvenigis la ĉeestantojn en sia urbo. Petis senkulpigon kaj sendis bondezirojn: G-roj Benoit, Bessière, Dehaire, Delcourt, Duvacher, Jossinet, Amouroux, Lecomte, Ligot, Motillon. Aparte menciindaj estas salutletero de S-ro Boisdé, deputito-urbestro de Bourges, kiu skribis en Esperanto kaj tiuj de alilandaj amikoj: D-ro Zeballos-Morales el Urugvajo kaj S-ro Vladimir Repka el Slovakio.

En la agadraporto, S-ro Colas dankas la nacian asocion, kiu faciligas regulajn kunvenojn de la konsilio ĉe sia pariza sidejo. Raportinte pri la IKUE-kongreso en Romo, li bedaŭras, ke la kongresa parto preskaŭ nuliĝis profite al pilgrimo okaze de la Sankta Jaro. Li salutas, nome de nia asocio, la novan prezidanton de IKUE, S-to Ceslao BIEDULSKI, prezentitan de F-to Marmou, kiu pasintjare renkontis lin.

S-ino Vincent legas la finanĉan raporton:

ENSPEZOJ		ELSPEZOJ	
Kotizoj	1 215,00	• Bulteno	779,32
Donacoj	468,00	• Korespondado	266,00
Rentumo ŝparkaso	128,34	• Vojaĝelspezoj	520,80
		• Helpe al junularo	300,00
			1 865,32

Saldo 1/1/75      2 357,91  
                    4 169,25

Profita saldo la 31/12/75      2 303,93

=====

La kongreso aprobas la agadan kaj finanĉan raportojn kaj renovigas trionon de la konsilio. Estas unuanime reelektitaj: S-to Degrelle, F-to Marmou kaj F-ino Vanneau, elektitaj du novaj konsilianoj: F-ino Preux kaj S-ro Villeneuve. Oni plendas, ĉar multaj anoj ne ĉeestantaj ne sendis sian rajtigilon.

Pri nia bulteno, S-ro Colas dankas S-inon Vincent kaj F-ton Marmou, kiuj daŭre kaj akurate pretigas nian "Franca Katolika Esperantisto". Li tamen bedaŭras, ke malmultaj skribas pri la lokaj grupoj, kaj li petas, ke ni informu regule nian redaktorinon pri nia agado kaj ke ni ne timu sendi ankaŭ sugestojn. Tuj ni informas nin reciproke: S-ro Greiner, instruisto apud Toul, gvidas neoficialan kurson por 6 lernantoj. S-to Degrelle el Nancy organizas perkorespondan kurson, same kiel S-ro Lecoq, fervojisto, ĉirkaŭ Tours. S-ro Henry gvidas kurson en Ste-Geneviève-des-Bois. S-to Bourdon instruas 6 gelernantojn en Lille. S-to Goudé, kun la Baugé-a grupo, pretigas pedagogian materialon por oficiala kurso en unuagrada lernejo en Le Vieil-Baugé.

S-to Bourdon parolas pri la Kunuloj de S-ta Francisko (v. n° 108, paĝo 4)

Pri religiaj kantoj, S-ro Despiney petas, ke oni presigu ilin, se eble, sur nia bulteno, sufiĉe frue antaŭ la kongreso. Estus ankaŭ dezirinde, ke ni pliriĉigu nian kantaron. Jam la ĥoruso "Rythme et Prière" estas preta kanti ĉe en Esperanto. Pri tiu temo S-to Degrelle konsentas renkonti S-ton David Julien kaj S-ron R. Bernard, cele al verkado de novaj kantoj. S-to Goudé skribos al S-to Leszek en Pollando pri la repertuaro de "Evangelia Ritmo" kaj petos permason de S-to Paruzel por represo.

NIA VENONTA KONGRESO okazos en La Houssaye-en-Brie je Pasko. F-to Marmou kaj la konsilio prizorgos ĝin.

RILATOJ KUN IKUE: S-to Degrelle, nova peranto en nia lando, plendas, ĉar li ne sukcesis havi la liston de la francaj IKUE-anoj; ĉi tiuj pagas sian kotizon en diversaj lokoj; pro tio ne estas facile kontroli. Li petas, ke niaj IKUE-estraranoj, S-to Goudé kaj F-to Marmou, skribu al S-ro Galbusera por havi taŭgan liston ke la FKEA-anoj informu lin pri sia aliĝo al IKUE, kaj pagu sian kotizon rekte al li (R. Degrelle ccp NANCY 714 95 P). Ĉi tio postulas reordigon ĉe la sekretario de IKUE kaj ankaŭ klarigojn pri la ŝajna konkurenco inter Espero Katolika kaj Katolika Sento.



VENONTJARA IKUE-KONGRESO: Ĉiu senpacience atendas la precizan daton de tiu pola kongreso kaj deziras, ke ĝi ne estu nura pilgrimado, sed ankaŭ kongresa afero.

DIVERSAJ INFORMOJ: juna Sud-Koreano petas helpojn por eldoni koreajn librojn pri Esperanto ( sendu la mondonacojn al S-ro Despiny).

- okazis en Banneux (Belgujo), la 12-an de septembro, la unua internacia pilgrimado al la "Virgulino de la Malriĉuloj".

NOVA INFORMILO FRANCLINFVA PRI IKUE KAJ FKEA: oni legas 4 proponojn. Post senrezulta debato, la plimulto konsentas, ke oni debatu kun la franca filio de KELI, cele al komuna informilo franclingva. Ni atendu la decidon de niaj protestantaj fratoj pri tiu propono.

Post dankvortoj de nia prezidanto, la kunveno finiĝas vespere per la komuna kanto "Reĝin' ĉiela".

Protokolis S-to Goudé.

[illegible]

KONSILIA KUNVENO de la 6-a de junio 1976

Ĉeestis: S-toj BOURDON kaj DEGRELLE, F-to MARMOU,  
S-inoj MICHAU kaj VINCENT,  
F-ino VANNEAU, S-roj COLAS, DESPINEY kaj VILLENEUVE.

Unuanima elekto de la novaj estraranoj:

Prezidanto: S-ro COLAS; vicprezidanto: S-to DEGRELLE; ĝenerala sekretario: S-ro DESPINEY; kasistino: S-ino VINCENT; helpkasisto: S-ro VILLENEUVE; religiaj konsilantoj: S-toj BOURDON kaj DEGRELLE; membroj: F-to MARMOU, S-ino MICHAU, F-inoj PREUX kaj VANNEAU, S-roj BESSIERE kaj VERON.

peranto por IKUE: S-to DEGRELLE.

Protokolis R. DESPINEY.

[illegible]

PRI ESPERO KATOLIKA

Okazis kelkaj malfacilaĵoj koncerne la revuon de Ikue: ĉiuj ne ricevas ĝin, aliaj ne regule. Mi multe penas por ke ĉiu estu kontenta pri mia peranteco. Ĉiufoje, kiam oni sciigas al mi iun ajn malfacilaĵon rilate la servadon de EK, mi skribas ĉu al la redaktoro, ĉu al la sekretario. Mi devas konfesi, ke ne ĉiufoje mi ricevas respondon. Estas grava bedaŭrindaĵo.

Mi daŭre opinias, ke ni bezonas bonan, akuratan, regule sendatan katon kaj internacian revuon. Kion fari?

Unue, averti min, kiam okazas neglataĵo. Due, obligi la abonantojn je EK. Tria, streĉi niajn fortojn, por ke la administrantoj de la revuo plibonigu sian servon. Ĉiujn dezirojn pri la revuo sendu aŭ rekte al EK aŭ pere de S-to Roger DEGRELLE 11, cours Léopold 54042 - NANCY.

[illegible]

## INFORMOJ

1) NOVA ELDONO DE LA BIBLIO EN SOVETUNIO: la 30-an de januaro 1976, la gazetaragentejo TASS sciigis, ke oni nun verkas ruslingvan eldonon de la Biblio, celante ĝian publikigon en Sovetunio. La agentejo ne sciigis, kiu respondecas pri tiu ruslingva eldono. Tamen, antaŭaj tradukoj estas pretigitaj po malgrandaj kvantoj pere de la oficialaj religiaj estraroj, nur por interna uzo.

(ABC, Madrido, la 2-an de februaro 1976)

2) En "Cercle des Pyrénées" (Cerbère), nia ano S-to Goerger prelegis pri Esperanto en la unua trimestro 1976.

3) Deziras korespondi: S-ro Grzegorz PIERZCHALA 33-101 TARNOW  
ul. Dunajcowa 220a Pollando. Li estas 20-jara, novbakita esperantisto kaj deziras  
korespondi kun francaj katolikaj junul(in)oj.



Estas interese, ke Kardinalo WILLEBRANDS esprimis sin favore al Esperanto en februaro 1974, kiam li akceptis en aŭdienco la polan kapucenon Georgon KORITKOWSKI, priparolante la sintenon de la kristanaj esperantistoj rilate la problemon de interkompreniĝo kaj ekumenismo. Post la aŭdienco, la 9-an de februaro 1974, Kardinalo WILLEBRANDS ankaŭ skribis leteron, dankante pro la alsendo de la libro de patro KORITKOWSKI "Ekumenismo kaj internacilingva problemo", kaj aldonante: "Mi multe aprecas la klopodon de la kristanaj esperantistoj meti la lingvan rimedon de la nova lingvo je la servo de la religia celo, kaj pli precize de la ekumena celo. Esperanto, kiel nova rimedo de interkompreniĝo, havas kiel sian idealon favori la interkompreniĝon, la unuecon kaj la pacojn inter la homoj. Por la kristanoj, mi deziras esprimi la esperon, ke la nova lingvo povos proponi ankaŭ ian kontribuon nian je la servo de ~~la kristanaj popoloj~~ la restarigo de la plena eklezia unueco. Mi bondeziras prosperajn rezultojn por via laboro, kun la certigo de mia preĝo kaj de mia beno".



Dank' al afabla artikolo aperinta en regiona gazeto, mi konatiĝis kun la internacia lingvo Esperanto. De unu jaro, mi provas lerni tiun ĉi mirindan lingvon per koresponda kurso. Tial ke bonvolaj estas la profesoroj, senpaga estas la kurso. Esperanto donis al mi tujan plezuron. Kompreneble, ankaŭ hodiaŭ la plezuro daŭras. Hejme, la tuta familio opinias, ke Esperanto multe helpas min, longdaŭre malsana. Ja, mi ne povas marŝi, sed nun ofte, mia spirito vojaĝadas tra kelkaj eŭropaj landoj. Alilandaj esperantistaj geamikoj korespondas kun mi. Iom post iom, mi konas ilin. Inter ni, reciprokaj amikeco kaj amemo ekzistas. Estas agrable ricevi leterojn, poŝtkartojn, librojn kaj eĉ fotojn el diversaj landoj. Ni ĉiuj estas feliĉaj pro interkompreniĝo. Ĉiuvespere, mi aŭskultas la programon en Esperanto de radio Varsovio. La ĵurnalistoj estas tre spertaj kaj bonhumoraj homoj! D-ro L. L. Zamenhof estis vere granda homo. Senĉese, li bondeziris feliĉon al la homaro. Ĉiutage, li mem per amo kreis feliĉon. Krom Esperanto, D-ro Zamenhof donacas al mi ankoraŭ du plezurojn: unue, pere de Esperanto, mi pli kaj pli ŝatas la gepatran lingvon. Due, la verda stelo estas granda simbolo. Ĉiuj steloj tre plaĉas al mi; mi rigardas kaj admiras ilin, kiuj, senpage, stelumas por la homoj en la ĉiela vasteco. Same kiel D-ro Z., mi opinias, ke Esperanto devas stelumi en la homaj koroj. Malgraŭ niaj diversaj okupoj aŭ fakoj, eĉ laciĝoj, ni disvastigu tiun ĉi praktikan lingvon, ne ĝorgesante paroli pri D-ro Z. Dum 29 jaroj de mia vivo, mi ne sciis tion: bonkora kaj genia viro kreis ilon por la Homaro, per kiu ĉiuj homoj povas fariĝi fratoj. Ho! ve! sur la tero, ankoraŭ multaj homoj ne konas Esperanton. Nu, pri tiu afero, ni neniam estos sufiĉe babil-emaj.



En la venontaj monatoj, Espero Katolika donos pli precizajn informojn.

Eloi THIOLLIERE.

[illegible]

## SPIRITAJ EKZERCOJ EN GOSTYN ( 4 - 12/7/76)

Roger DEGRELLE.

XXX

NIA MEMBRARO - - - -

Novaj membroj 1976: 4) S-ro DELIGNE (Aude); 5) S-ro BIRON (Sarthe);  
6) S-ro ZIELONKA (Pologne)

\* \* \* \* ANTAUDIRO DE SANKTAPADILA \* \* \* \*

Aŭskultu, aŭskultu, ho frato mia! Ĉar mi vidis la teruron de la arĉanĝoj kaj de la montaroj...Subite ektimigo kaptis la popolojn. Jen alvenis la tempo, kiam Germanio estos nomita la plej batalema nacio sur la tero. Jen alvenis la epoko, kiam subite eliros el ĝia sino la terura militanto, kiu entreprenos la "mondmiliton", kaj kiun la armitaj popoloj nomos "Antikristo", li estos malbenata de la patrinoj, kiuj priploros siajn infanojn kiel Raŭelo kaj ne volos esti konsolataj.

Dudek diversaj popoloj interbatalos en tiu milito. La konkerestro eliros el la bordoj de Danubo. La milito, kiun li entreprenos estos la plej terurega, kiun la homaranoj estis ĝis nun devigataj elteni. Liaj armeoj estos flambrilegaj (kaj la kaskoj de liaj soldatoj estos provizitaj per dornformaj pintaĵoj, kiuj elĵetos fulmobrilojn, dum liaj manoj minace svingos flamajn torĉojn.)

Li gajnos venkojn sur la tero, sur la maro kaj eĉ en la aero, ĉar oni vidos liajn militistojn, en neimageblaj rajdadoj, plialtigi sin en la firmamenton, por tie kapti la stelojn, kaj poste perforte ĵetadi ilin super la grandajn urbojn, kaj tie, ekfajrigi nekontraŭstareblajn brulegojn. La nacioj ekmiros kaj ekkrios: "De kie venas lia potenco?" La tero fundege aliiĝos, pro la kolizio de la homoj dum la bataloj, la riveregoj ruĝiĝos per la homa sango, kaj eĉ la mar-monstroj diskuros terurigaĵoj ĝis la plej profundegaj abismoj de la oceanoj.

La venontaj generacioj ekmiros, ke liaj kontraŭuloj ne povis malhelpi la antaŭiradon de liaj venkoj. Torentoj de homa sango fluos ĉirkaŭ la monto, kaj tio estos la lasta batalo.

Tamen, la konkeristo estos atinginta la apogeon de siaj triumfoj, proksimume ĉirkaŭ la meza parto de la sesa monato de la dua jaro de la militaĵo. Tio estos la fino de la unua "periodo de la multmorta venko." Tiam, li opinios, ke li povas trudi siajn kondiĉojn.

La dua parto de la milito estos tiel longa kiel la duono de la unua parto. Oni nomos ĝin "periodo de superpotencoj." Ĝi estos riĉa je neatenditaĵoj, kiuj konvulsie tremigos la popolojn. Ĉirkaŭ la meza parto de tiu tempo, la popoloj obeantaj la konkeristojn krios petegante: "Pacon!..pacon!.." Sed estos nenio paco. Tio ne estos la fino, sed la komenco de la fino, kiam la batalo okazos en la urbo de la urboj. Tiam, multaj adeptoj de la konkeristo intencos lin ŝtonmortigi.

Sed okazos mirindaĵoj en Oriento. La tria periodo mallonge daŭros.

Oni nomos ĝin "invada periodo", ĉar, dank' al justa kompenso, la nacio de la konkeristoj estos invadata ĉiuflanke. Ĝiaj armeoj preskaŭ tute pereos pro grava epidemio, kaj ĉiuj diros: "Ĉi tie estas la fingro de Dio?".

La popoloj opinios, ke ilia fino estas tuj venonta, sed la sceptro iros en alian manon, kaj sekve ĝojos pro tio miaj fideluloj. Ĉiuj popoloj perforte kaj ruze senproprigitaj reakiros tion, kio estis perdita, kaj eĉ iom pli. Tamen, ĉiuj kredis, ke estas trapasanta la horo de ilia pereco. La "Luteca" regiono estos savita per si mem, pro siaj benataj montoj kaj siaj piaj virinoj. Ĉiuj popoloj kunvenos sur tiuj montoj kaj dankodiros al la Sinjoro, ĉar la homoj vidis tiajn abomenaĵojn en tiu milito, ke la venontaj generacioj tion ne plu toleros. Malfeliĉo tamen estu al tiuj, kiuj ne timos Antikriston. Ĉar li alvokos novajn mortigantojn.

Sed pacepoko sen la armeo jen estos alveninta, kaj oni vidos la du kornojn de la luno, kiuj reunuiĝos kun la kruco, ĉar, en tiuj teruraj tagoj, la homoj timoplenaj adoras Dion en tuta vereco, kaj la suno brilegos kun nekutima blindiga lumego.

Robert GENDRE (diplomita profesoro de LI Esperanto -APK)

Teksto tradukita el la gazeto "Chanteclair" n° 73 jan-feb. 76 p. 4

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19 20 21 22 23 24 25 26 27 28 29 30 31 32 33 34 35 36 37 38 39 40 41 42 43 44 45 46 47 48 49 50 51 52 53 54 55 56 57 58 59 60 61 62 63 64 65 66 67 68 69 70 71 72 73 74 75 76 77 78 79 80 81 82 83 84 85 86 87 88 89 90 91 92 93 94 95 96 97 98 99 100 101 102 103 104 105 106 107 108 109 110 111 112 113 114 115 116 117 118 119 120 121 122 123 124 125 126 127 128 129 130 131 132 133 134 135 136 137 138 139 140 141 142 143 144 145 146 147 148 149 150 151 152 153 154 155 156 157 158 159 160 161 162 163 164 165 166 167 168 169 170 171 172 173 174 175 176 177 178 179 180 181 182 183 184 185 186 187 188 189 190 191 192 193 194 195 196 197 198 199 200 201 202 203 204 205 206 207 208 209 210 211 212 213 214 215 216 217 218 219 220 221 222 223 224 225 226 227 228 229 230 231 232 233 234 235 236 237 238 239 240 241 242 243 244 245 246 247 248 249 250 251 252 253 254 255 256 257 258 259 260 261 262 263 264 265 266 267 268 269 270 271 272 273 274 275 276 277 278 279 280 281 282 283 284 285 286 287 288 289 290 291 292 293 294 295 296 297 298 299 300 301 302 303 304 305 306 307 308 309 310 311 312 313 314 315 316 317 318 319 320 321 322 323 324 325 326 327 328 329 330 331 332 333 334 335 336 337 338 339 340 341 342 343 344 345 346 347 348 349 350 351 352 353 354 355 356 357 358 359 360 361 362 363 364 365 366 367 368 369 370 371 372 373 374 375 376 377 378 379 380 381 382 383 384 385 386 387 388 389 390 391 392 393 394 395 396 397 398 399 400 401 402 403 404 405 406 407 408 409 410 411 412 413 414 415 416 417 418 419 420 421 422 423 424 425 426 427 428 429 430 431 432 433 434 435 436 437 438 439 440 441 442 443 444 445 446 447 448 449 450 451 452 453 454 455 456 457 458 459 460 461 462 463 464 465 466 467 468 469 470 471 472 473 474 475 476 477 478 479 480 481 482 483 484 485 486 487 488 489 490 491 492 493 494 495 496 497 498 499 500 501 502 503 504 505 506 507 508 509 510 511 512 513 514 515 516 517 518 519 520 521 522 523 524 525 526 527 528 529 530 531 532 533 534 535 536 537 538 539 540 541 542 543 544 545 546 547 548 549 550 551 552 553 554 555 556 557 558 559 560 561 562 563 564 565 566 567 568 569 570 571 572 573 574 575 576 577 578 579 580 581 582 583 584 585 586 587 588 589 590 591 592 593 594 595 596 597 598 599 600 601 602 603 604 605 606 607 608 609 610 611 612 613 614 615 616 617 618 619 620 621 622 623 624 625 626 627 628 629 630 631 632 633 634 635 636 637 638 639 640 641 642 643 644 645 646 647 648 649 650 651 652 653 654 655 656 657 658 659 660 661 662 663 664 665 666 667 668 669 670 671 672 673 674 675 676 677 678 679 680 681 682 683 684 685 686 687 688 689 690 691 692 693 694 695 696 697 698 699 700 701 702 703 704 705 706 707 708 709 710 711 712 713 714 715 716 717 718 719 720 721 722 723 724 725 726 727 728 729 730 731 732 733 734 735 736 737 738 739 740 741 742 743 744 745 746 747 748 749 750 751 752 753 754 755 756 757 758 759 760 761 762 763 764 765 766 767 768 769 770 771 772 773 774 775 776 777 778 779 780 781 782 783 784 785 786 787 788 789 790 791 792 793 794 795 796 797 798 799 800 801 802 803 804 805 806 807 808 809 810 811 812 813 814 815 816 817 818 819 820 821 822 823 824 825 826 827 828 829 830 831 832 833 834 835 836 837 838 839 840 841 842 843 844 845 846 847 848 849 850 851 852 853 854 855 856 857 858 859 860 861 862 863 864 865 866 867 868 869 870 871 872 873 874 875 876 877 878 879 880 881 882 883 884 885 886 887 888 889 890 891 892 893 894 895 896 897 898 899 900 901 902 903 904 905 906 907 908 909 910 911 912 913 914 915 916 917 918 919 920 921 922 923 924 925 926 927 928 929 930 931 932 933 934 935 936 937 938 939 940 941 942 943 944 945 946 947 948 949 950 951 952 953 954 955 956 957 958 959 960 961 962 963 964 965 966 967 968 969 970 971 972 973 974 975 976 977 978 979 980 981 982 983 984 985 986 987 988 989 990 991 992 993 994 995 996 997 998 999 1000 1001 1002 1003 1004 1005 1006 1007 1008 1009 1010 1011 1012 1013 1014 1015 1016 1017 1018 1019 1020 1021 1022 1023 1024 1025 1026 1027 1028 1029 1030 1031 1032 1033 1034 1035 1036 1037 1038 1039 104

--- DEMANDARO PRI IKUE ---

Nomo kaj voknomo:

Kompleta adreso:

Mi estas/ne estas ano de IKUE. Mi ricevas/ne ricevas Espero Katolika

Bonvolu plenigi tiun demandaron kaj sendi ĝin al S-to Degrelle  
11, cours Léopold 54042 - NANCY CEDEX

0 0 0 0 0 0 0 0 0 0

la aŭ malfacila.

Estas vojo al lernejo, vojo al ferioj, vojo al preĝejo, vojo al amo aŭ mal-amo, vojo al justeco, al milito aŭ paco, vojo al morto, malsano aŭ vovo kaj sano, vojo al ekzameno, profesio, feliĉo, ĝojo kaj al ĉiuj ties maloj!

Oni povas serĉi sian vojon, montri lian vojon al petanto aŭ vojerarinto. Oni povas iri, gardi, perdi, retrovi, trabori sian vojon. Oni povas deziri al si aŭ al alia bonan, sukcesan, agrablan vojon. Kaj kiam finfine oni trovis sian vojon, kiel diras la proverbo: "Hunda bojas, homo vojas".

Estas do ne mirinde, ke la Biblio grandskale uzas tiun vorton "Ĉar la Eternulo konas la vojon de piuloj; sed la vojo de malpiuloj pereos" (Ps. 1, 6) kaj, pro tio, la kredantoj preĝas tiel: "Komprenigu al mi la vojon de Viaj ordonoj" (Ps. 119, 27).

Sekve, ne estas strange, ke Jesuo, resumante en sia persono kaj la Malnovan kaj la Novan Testamenton, proklamis: "Mi estas la Vojo" (Jo. 14, 6). Ofte li estis survoje. Survoje li vidigis blindulojn, marŝigis lamulojn, aŭdigis surdulojn, levigis mortintojn, predikis evangelion al malriĉuloj. Plie, survoje li multe klarigis pri la Regno de sia Patro, li vokis siajn disĉiplojn kaj apostolojn kaj invitis ilin sekvi lin. Li sendis ilin al la disirejoj de la vojoj, por ke, kiel li, ili voku. Li donis por manĝi, por ke ili ne laciĝu sur la vojo. Li konsilis, ke oni rapide konsentu kun la kontraŭulo, dum oni estas kun li sur la vojo. Li parolis pri la semoj, kiuj falis apud la vojo kaj, kiam la saĝuloj estis vidintaj lin, ili foriris per alia vojo. (Mt. 2, 12; 13, 4; 15, 32; 20, 17; 20, 30; 22, 9; Luk. 7, 22 ...)

Dum la ĵus pasintaj ferioj, ni sekvis multajn vojojn al maro, montaro, ebenaĵo, al trankvileco por retrovi nian kvietecon. Ĉu ene de nia kvieteco, ni provis retrovi nian vojon al feliĉo, amo, paco, unuvorte al Jesuo?

Roger DEGRELLE.

\*\*\*\*\*

==== NOTO DE LA KASISTINO ====

Pro la plialtigo de la poŝtaj tarifoj, la nuna jarkotizo estas 10 F; sekve, jen la

KOTIZTABELO 1977

IKUE kun "Espero Katolika" . . . . . 27 F  
IKI kun "Vojo, Vero, Vivo" . . . . . 5 F

Nepre pagu al la peranto R. Degrelle c.c.p. NANCY 714 95 P.

-:-:-:-

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . 10 F  
(infanoj malpli ol 16-jaraj, sacerdotoj, religiul(in)oj . . . . . 5 F  
Membro bonfaranto . . . . . 50 F  
Dumviva membro . . . . . 200 F

U.F.E. kun "Revue Française" . . . . . 66 F  
U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . 88 F

Association cath. franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . 30 F

Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

\*\*\*\*\*

Dépôt légal: 3ème trimestre 1976  
Papier de presse n° 34 745  
Directeur-gérant: Gaston Véron

/// Polycopié par: F. M. C.  
/// Prieuré St-Martin  
/// LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE

%%%%%%%%%%